

**OMAGĜE AL DU GLOROJ  
DE LA ITALA MUZIKO:**

**ARTURO TOSCANINI**

**KAJ**

**MAGDA OLIVERO**

**Emilio Spedicato  
Universitato de  
Bergamo Decembro 2007  
emilio@unibg.it**

**Dediĉita al:**

**Giuseppe Valdeno, baritonulo elektita de Toscanini, kaj kiu revenis al  
la Majstro la unuajn tagojn de Oktobro 2007**

**Skribaĵoj verkitaj por la revuo Liberal, ĉi tie estas donitaj kun margenaj ŝanĝoj.  
Mia dankemo al Grafino Emanuela Castelbarco, nepino de Toscanini, pro la kontrolo de la  
parto pri ŝia avo kaj pro la sugestoj, kaj al Sinjorino del la lirika muziko, Magda Olivero  
Busch, pro la kontrolado de la parto kiu koncernas ŝin. La fotografiaĵo kiu troviĝas sur la  
lasta paĝo prezentas s-ron Spedicato kun s-rino Olivero kaj ĝi estis fotita printempe en 2007.**

# REMEMORO PRI TOSCANINI

## ITALA GLORO DE LA DUDEKA JARCENTO

Kiel mi antaŭe deklaris en mia artikolo pri Andrea Luchesi kaj Mozart ( Ĉi tie mi anoncas ke la nova verko de Taboga pri la morto de Mozart estos baldaŭ eldonita, ĝi enhavos materialon eltrovitan dum la lastaj dek jaroj) mi ne estas muzikologo, mi estas nur homo interesiĝanta pri klasika muziko kaj, dum la plej lastaj jaroj, pri opero kaj popolmuziko. Mi havis la ŝancon renkontiĝi kun vere grandaj homoj rilatantaj muzikon, kiel la pianisto Badura-Skoda, kaj opero- steluloj kiel Taddei, Valdengo, (forpasita en la jaro 2007) Di Stefano (jam paralizita post perforta atako de rabistoj en Kenjo kie ili frapis al li la kapon kiam li klopodis savi la medalon kiun al li donacis Toscanini; li mortis en marto 2008a) Bergonzi, Prandelli, Anita Cerquetti kaj precipe Magda Olivero. Kaj la listo de la libroj kiujn mi legis pri ĉi tiuj homoj estas longega, naŭ nur pri Toscanini. kaj mi ankaŭ povis komuniki kun Harvey Sachs, ĝenerale konsiderita kiel la ĉefa biografo de Toscanini, por klarigi al li kial Toscanini disiĝis de Alberto Erede kaj por sciigi al li ke, kontraŭe al tio kion li deklaris en sia verko pri la leteroj de Toscanini al siaj amatinoj, tie ekzistas unu letero de unu el liaj amantinoj, Rosina Storchio. Ĉi tiu letero troviĝas en nelonga biografio pri Storkio, havebla ĉe Museo Storchio en Dello, apud Brescia, la dua plej granda muzeo en Italio pri kantotekstoj, ( kiu entenas la unuan kolekton de libretoj en la mondo,) sed ĝi estas preskaŭ nekonata! Ĉar Sachs praktike malaperis el Italio, eble pro profitdona konferencturniro pri Toscanini en Usono kie la granda orkestrestro certe estas pli rememorata ol en Italio, *nemo propheta in patria*, Tiaj novaj informoj aperas en la verko "*Toscanini, dolce tiranno*" de Renzo Allegri, eble la plej bona verko baziĝanta sur la rememoroj de la filinoj de Toscanini Wanda kaj Wally skribitaj kaj eldonitaj antaŭ kelkaj jaroj en tre disvastiĝinta revuo.

Ekde nun mi volas paroli pri Toscanini per la mallongigo T. En nia hejmo li estis ŝatita pli ol iu ajn alia Italo de lia jarcento, eble ĉar mia avo estis la unua interpretisto pri fremdaj lingvoj en Milano je la komenco de 20a jarcento, kaj sekve li certe devas esti renkontiĝinta kun T. ĉe La Scala. Kaj lastatempe mi aŭdis de mia onklino, pli ol naŭdekjaraĝa, kaj de alia mia familiano preskaŭ samaĝa kiel ŝi, ke Aureliano Pertile, la tenorulo preferita de T. pro lia eksterordinara esprimkapablo, kutimis viziti nian hejmon por ludi la pianon kaj por kantado. Mi suspektas ke iuj partituroj supervivintaj la detruon de la avina domo fare de la lasta brita bombo faliĝinta sur Milano-n ("*Mi par d' udire ancora....*" "*E lucevan le stelle*") apartenis al Pertile. Kaj mi memoras la malĝojon kiu frapis nian familion kiam, -- mi estis dekdujaraĝa tiutempe -- alvenis la novaĵoj pri la forpaso de T. Ĉar mi ne estas sufiĉe kvalifikita por diskuti pri la muzikaj flankoj de la laboro de T., kiu de post kelkaj jaroj estas la objekto de verŝajne nepravigebla revizio, mi nur konsideros, denove per anekdotoj, la ĉefajn flankojn de lia vivo. Por pli ampleksa prezentado estas ofertitaj pli ol dekduo da libroj. Mi ankaŭ rekomendas viziton al la domo kie li estis naskiĝinta en Parma kaj al la tiea konservatorio, kiu havas ĉambron dediĉita al li.

T. naskiĝis je la 25a de marto en 1867 en Parma laborista komunumo trans la rivero; lia patro estis kontraŭreligiulo kaj garibaldiano, lia patrino estis katolika praktikantino. Baldaŭ liaj muzikaj kvalitoj estis eltrovitaj, ekzemple, kiel povi reprodukti per la fortepiano, post nur unu aŭskultado, melodiojn kiujn li ne estis studinta antaŭe. Li akiris subvencion por frekventi

la lokan konservatorion, kie estis strikta disciplino, malabunda manĝaĵo, neniuj varmigiloj, kaj deviga amasa ĉeestado dum la Sankta Meso ĉiun matenon, sed kie la instruistoj estis tre bonaj. Iatempe, pro iu malobservo de reguloj, li devis pasigi dudek kvar horojn en malgranda malluma ĉambro, tenante nur sian violonĉelon. Al li ne estis permesite uzi la banĉambrojn, tial li uzis la violonĉelon kiel ujon. La sekvontan tagon la instruisto demandis: “ kio okazis al via violonĉelo, ĝi ŝvitas! ” Baldaŭ liaj samlernejoj komencis nomi lin “ la geniulo ”.

Fakte ili estis notintaj alian eksterordinaran memoron kaj alian pasion al lernado de ĉiu speco de muziko kaj al ludado de ĉiu instrumento. Instruisto demandis kial li estis tiel nomita, kaj volis testi lin. Unue li petis al li ludi partituron unuavide por poste ludi ĝin laŭ memoro; poste la sama instruisto petis lin rigardi partituron de Wagner kaj interpreti ĝin per la violonĉelo .

Surprizita pro la miriga elfaro de T. li diris: “ *estas vere, T., vi estas geniulo.* ” La eksterordinara memoro de T. estas fakto de historia graveco en la homa historio.

Lia memoro estis de la vida tipo: li povis memori egale malpurajn punktojn aŭ skrapsignojn en la paĝo. Li parkerigis pli ol 1500 operojn kaj simfoniajn laborojn. Iatempe orkestromembro diris al li ke li ne estis povanta ludi ĉar unu el la klavoj de lia instrumento estis disrompita tiel, ke ia noto ne povas esti produktita. T. demandis kiu noto estis tiu, poste li diris al li ke tia noto ne aperas en la parto kiun li devas ludi! Alian fojon, kiam li estis preskaŭ naŭdekjara, pianisto Delli Ponti, kiu iam vizitis lin por ludi iun barokan muzikon (ne multe antaŭe praktikata de T.), diris al li: “ *Mi volas ludi preskaŭ nekonatan pecon de Frescobaldi....* ” Tiam T. respondis, memorante esti vidinta tiun pecon kiam li estis konservatoria studento: “ *ekzistas du presitaj versioj, ambaŭ kun eraro ĉe la kvara takto.* ” Oni ĉiukaze devas memori tiujn aliajn personojn, kiel De Sabata inter muzikistoj kaj Von Neumann inter sciencistoj, kiuj ankaŭ havis grandegan memoron. Ni povas memori ankaŭ la kazon, ofte cititan de Oliver Saks, pri rusa viro kiu, per grava ĝeno, memoris ĉion pri sia ĉiutaga vivo..... aŭ eĉ la kirghiziajn bardojn, nomitaj Manaschi, kiuj memoras grandan parton de la ses milionoj da versoj de ilia nacia epopeo de Manas.

Ĉe la konservatorio T. fariĝis specialisto pri violonĉelo, sed ni scias malmulton pri lia kvalito kiel ludanto. Ni scias ke en la sekvantaj jaroj li ludis la fortepianon por akompani kantistinojn; dum liaj lastaj jaroj li elspezis plenajn tagojn ĉe la fortepiano, ludante plenajn operojn kantante ilin per voĉo tre esprimplena kaj tute en melodio. (Ĉi tiu povas esti aŭskultata en fama disko de Traviata provludo kie Violetta estas Licia Albanese, kiu ankoraŭ vivas en Novjorko kaj estas preskaŭ centjaraĝa...)

Estante deknaŭjaraĝa T. forvojaĝis por turneo en Suda Ameriko kiel violonĉelisto. Li jam parkerigis dudekon da operoj kaj dum la vojaĝo li amuziĝis, krom allogante iujn kantistinojn (T. estis nesuperebla amindumanto kaj, kiel diris al mi lia nepino Emanuela Castelbarco, la virinoj nepre falis en iliajn brakojn), ankaŭ estrante diversajn operojn en kiuj kantis kaj ludis iliaj amikoj. En Brazilo la malbonega estrado de la orkestrestro estigis multe da huado en koncerto kiun ĉeestis la imperiestro Dom Pedro. La turneo riskis fini lasante la ludistojn kaj la kantistojn sen mono por pagi la revenbileton. Tiam ĥoristino sin adresis al T. alparolante lin la dialekton de Parma kaj petegante lin suriri la podion kiel orkestrestro. Post kelkaj hezitoj T. akceptis la taskon kaj eniris la scenejon sen antaŭaj provludoj kaj sen la frako kaj li estris la orkestron – kiel li deklaris poste – kvazaŭ li ektrancus kun fermitaj okuloj. Estis triumfo, la publiko aplaŭdegis konsciiĝinte sin trovi antaŭ ne nur al tre juna orkestrestro sed eĉ al muzikisto kun eksterordinaraj kapabloj, kaj la imperiestro donis al li altvaloran skatoleton. Post tiu triumfo T. endormiĝis kaj profunde dormis sed, matene, ripetinte la operon en sia menso mem, li ekkonsciis ke li fuŝis du notojn, tio estis okazaĵo kiu, eble, neniam ripetiĝis dum lia tuta vivo! Kaj la triumfo ripetiĝis la sekvantajn tagojn de la travojaĝo, kun la ĵurnaloj ĉiam aŭgurantaj grandan estontecon al li kiun li, fakte, havis.

Reveninte al Italio, T. pensis daŭrigi sian karieron kiel violonĉelisto, kaj dum kelkaj jaroj li estis eĉ muzikverkisto; li detruis siajn komponaĵojn kiam, aŭdinte Wagneron, li konsciis ke li neniam estus povinta lin superi. Tamen la renomo pri lia sukceso en Usono jam disvastiĝis kaj tre baldaŭ li estis vokita kiel orkestrestro de diversaj orkestroj, ekde Torino kaj, post malmultaj jaroj eĉ “La Scala” en Milano kie li estis, dum multaj jaroj, estro kaj prizorganto; tial li sukcesis ŝanĝi por ĉiam la koncepton pri teatraĵo kaj pri koncertoj. Tiu ĉi ne estas la ĝusta loko por pridiskuti la novaĵojn de li alportitajn, batalante kontraŭ la aŭdantaro, la orkestro kaj la kantistoj; aparte ĉi lastaj estis kutimiĝintaj modifi la verkojn de la aŭtoro laŭ siaj propraj profitoj. Ni nur diras ke T. estis puŝita de eksterordinara respekto al la origina teksto kaj al la volo de la komponisto kaj ke li postulis preskaŭ sanktan atenton fare de la aŭskultantaro (adiaŭ al la kartludoj aŭ al vespermanĝoj dum la prezentadoj). Li postulis perfektan interpreton laŭ la ritmo kaj esprimmaniero de la muzika teksto fare de la orkestro mem. Oni bone konas liajn maldelikatajn manierojn, foje preskaŭ akregajn, sed tiaj ili estis nur sur la scenejo kaj certe ili estis tute forgesigitaj de la grandanimeco per kiu li helpis la orkestranojn kiuj bezonis monhelpojn. Li konis multe da komponistoj ekde Verdi, kiun li vizitis en Ĝenovo pro interpreta disputo naskiĝinta inter li kaj Tamagno.... kaj Verdi konfirmis ke la memoro de Toscanini pravis. Li estis ankaŭ granda amiko de Puccini kun kiu li havis eĉ akrajn disputojn, aparte pri politiko, ĉar Puccini estis proksima al faŝismo, T. konatiĝis, krome, kun Catalani, Boito, Mascagni ktp... Dum la Unua Mondmilito T. ofte proksimiĝis al la fronto por estri orkestron antaŭ la militistoj eĉ estante en vera mortdanĝero kaj li neniam volis esti pagita. Li tion rifuzis ankaŭ kiam li iris al Bayreuth, kiu estis por li kvazaŭ templo por Wagner, kaj en Palestino por subteni la unuajn hebreajn komunumojn.

T. interesiĝis pri politiko, kvankam ne je la nivelo de aktivulo; proksima al Mussolini ĝis kiam tiu ĉi estis socialisto, T. poste deflankiĝis de li kaj fariĝis lia akra kritikanto sen timo montri sian kontraŭstaron al li. Rifuzinte ludi faŝismajn himnojn, kiel, ekzemple, “Giovinezza” antaŭ la operoj kaj koncertoj de li estritaj, en Bolonjo T. estis atakita de faŝista bando de junuloj gvidata de Farinacci, li estis eĉ vangofrapita kaj minacita je morto. Mussolini malakceptis respondecon pri tiu afero dirante ke T. devis estri nur orkestron je cent homoj kaj ke li devis regi la tutan Italion. Post tiu ĉi evento T. forlasis Italion por iri al Usono, kie li estis grandege sukcesa kaj NBC metis novan orkestron je lia dispono. Lia domo en Riverdale fariĝis fokusa centro por muzika vivo kaj rifuĝo por oponentoj de Mussolini. En Usono, ĉar li jam estis preterpasinta la aĝon por normala emeritiĝo, li reduktis sian pli postuleman pezan agadon kun operoj, koncentriĝinte sur la koncertoj. Dum liaj koncertoj ludis pianistoj kiel Serkin, Rubinstein, Horszowski, Horowitz, (ĉi lasta fariĝis lia bofilo en 1933 edziniĝinte lia dua filino Wanda) kaj violonistoj kiel Heifetz kaj Busch. T. ne ĉiam estis en perfekta interkonsento kun tielaj steluloj: tiurilate oni vidu la sekvontan rimarkon de O’ Connel pri la Betovena violonkoncerto de li ludita kune kun Heifetz: “*estis amuze observi ĉi tiujn du virojn tiel egalajn kiel perfekteculojn sed ankaŭ, sekve, malsamajn laŭ aĝo, karaktero kaj muzikaj ideoj ludi kune. Ili ŝajnis ekstere montri reciproke la plej grandan respekton, sed vere ili estis suspektaj kiel du katoj kiuj ne konas unu la alian, ĉiu forte volante atingi perfektecon iel ajn kaj en ĉiu tempo...*”

Kiam la milito finiĝis li revenis al Italio okaze de la koncerto kiu remalfermis la rekonstruitan teatron “La Scala”. Post la provaŭskultado por la sopranulo, T. elektis Tebaldi-n, kiu ĵus komencis sian internacian karieron kiel kantistino kun la kromnomo “voce d’ angelo.” Tamen T. estus dezirinta havi kiel sopranulinon je tiu okazo Magda-n Olivero-n, kiu estis forlasinta la scenejojn en 1941. Li petis la estrojn de La Scala kontaktiĝi kun ŝi, sed ili tion ne faris. Do, neniam kantis kun T. Sinjorino Olivero, kiu post malmulte da tempo rekomencis kanti operojn laŭ prema insistado de Cilea, kaj al kiu, dum li ŝin trejnigis por kanti “Adriana Lecouvreur-n, Tullio Serafin diris:”Vi estas ĉiam la numero unu”. Tamen ŝi renkontis lin en Sirmione, kie T. dum du horoj donis al ŝi sian propran takson pri kantistoj kaj muzikistoj, kies publikigo estus tre interesa. (Sed tio neniam okazos ĉar Sinjorino Olivero tion neniam

faros). La malferma koncerto de La Scala, okazis kun tropleniĝinta teatro kaj T. estis ricevita per 37 minutoj de aplaŭdado.

Inter la finaj operoj estritaj de T en Usono: Aida, Traviata, Otello kaj Falstaff (kiuj estis konsideritaj de T la plej bonaj Italaj operoj; inter la operoj de Puccini la plej bona, laŭ li estas Manon). Inter la kantistoj ĉeestis la inauguran koncerton de la "Scala" la sopranulino Licia Albanese, kiu ankoraŭ vivas, kaj la baritonulo Valdengo (Sub lia estrado ankaŭ kantis la juna stelulo Di Stefano, kies mirinda voĉo kaj esprimmaniro estis multe ŝatataj de T. kiu donis al li oran medalon kun lia portreto, por savi ĝin de atakintoj en Kenjo la granda tenorulo estis la objekto de agoj de perforto .

T. transvivis sian edzinon Carla nur malmulte da jaroj; ili estis geedzoj dum 54 jaroj. La geedziĝo estis malfacile vivtenebla pro la oftaj edzoperfidoj de T. kiu estis vere tre allogita de virinoj. tamen la edzino Carla sukcesis elteni tiun situacion. Inter la amatinoj de T. ni parolos nur pri la belega kaj bona sopranulino Rosina Storchio (oni vidu sian portreton ĉe la Muzeo de la "Scala" en Milano). De li ŝi havis knabon, kiu mortis adoleska kaj estis handikapita. Sinjorino Storchio dum siaj lastaj jaroj vivis en Milano kie ŝi flegis la handikapitajn infanojn. Antaŭ sia morto ŝi skribis al T. leteron plena je granda sereneco, dankante lin pro lia helpo en ŝia muzika kariero kaj dirante al li ke ŝi ..estus atendanta lin en la Ĉielo.

T. ne ŝatis pastrojn, kaj ĉesis iri al preĝejo post la ofteco de la preĝadoj en la konservatorio. Li estis kredanto, sed neparolema pri religiaj demandoj. T. ĉiam havis en la brustopoŝo de sia jako krucifikson, kiu estis metita inter liaj manoj en la ĉerko. Li mortis preskaŭ naŭdekjaraĝa kelkajn tagojn post kiam lia amata disĉiplo Cantelli pereis en aviadila akcidento. T. havis ikton kaj mortis post nur deko da tagoj.

Li estis en kontakto kun nur unu pastro, kiun li multe respektis, temis pri Pastro Gnocchi. Liaj filinoj petis Pastron Gnocchi por ke li venu al NovJorko por konfesi ilian patron. Li alrespondis: "*ne estas necese , li jam faris multe da bono dum sia vivo...*"

La helpanto de Pastro Gnocchi estis Don Giovanni Barbareschi, mia profesoro pri religio en mezlernejo, kiu estis nomita de Israelo "*viro de virto en ĉiuj landoj*" pro tio, ke li estis savinta multe da Judoj kondukinte ilin al Svislando tra la montoj -- kaj li finis pro tio en koncentrejo ...) Pastro Gnocchi, kun T., unu el la malmultaj italaj gloroj en la 20a jarcento, sed strange ankoraŭ ne proklamita sanktulo.

Je la 25a de marto 1910 -- la saman tagon de T. sed 43 jarojn poste. naskiĝis -- en Saluzzo alia gloro de la Itala muziko. Temas pri Maria Maddalena, aŭ Magda, Olivero, ankoraŭ viva kaj aktiva voĉo post 3 aŭ 4 generacioj. La sekvonta sekcio temas pri ŝi.

## **FELIĈAN NASKIĜDATEFESTON, “SIGNORA DELLA LIRICA”!**

El la Enciklopedio “Le Muse” (De Agostini, 1967), jen kiel tri Italaj sopranulinoj de la dudeka jarcento estas prezentataj:

**ROSINA STORCHIO** (Verono 1876, Milano 1945), komencis sian karieron en Milano per Carmen en 1892. Ŝi estis baldaŭ vokita al la grandaj teatroj, kaj havis intensan internacian karieron, kantinte ofte ankaŭ en Italio. Dotita per voĉo de la lumolirika tipo, kun delikata tono kaj tre pura arĝenta koloro, ŝi evoluigis vastan repertuaron, kun plej bonaj rezultoj je la intimaj roloj apud sia temperamento (Mimi, Butterfly....). Ŝi estis pasia interpretistino kaj granda aktorino.

**CLAUDIA MUZIO** (Pavia 1892, Romo 1936) Ŝi debutis sur la scenejo en Arezzo per la opero Manon de Massenet. Atinginte “La Scala-n” frue en ŝia kariero, baldaŭ ŝi havis grandajn sukcesojn ĉe la plej bonaj teatroj en la tuta mondo. Ŝi estis rimarkinda pro sia vasta repertuaro, kiu inkluzivis laborojn de la altlirika, kaj drameca tipo. Ŝia voĉo, ne estis tre rimarkinda pro la volumo, sed pro la grandega fascino, ĝi povus esti fiksita inter tiu, de drameca soprano kaj altalirika. Ŝi povis esprimi iu akcento, de la plej intense drameca ĝis la plej malfeliĉa.. Ŝi estis ne nur genia interpretisto pri lirika muziko sed ankaŭ aktorino.

**MAGDA OLIVERO** (Saluzzo 1910) estis konsiderita ekde la komenco de sia kariero kiel unu el la plej grandaj lirikaj sopranulinoj en sia epoko; ŝi estis aktiva en la verista repertuaro. Ŝi havis stilon de vortumo, mola kaj persvada tono, kuplita kun la arto de granda aktorino, kaj fariĝis la plej granda kantisto-aktorino en verismo de niaj tempoj. Ŝia voĉo, iatemp tre longigita, estas pura emajlo, kaj povas produkti grandiozan sinsekvaĵon kaj orajn duonovoĉoj, kies fascino estas plibonigita de vibro des pli rimarkinda pianissime.

Je la 25 a de marto 1867, Arturo Toscanini, gloro de la dudeka jarcento pri itala muziko, naskiĝis en Parma. Je la 25<sup>a</sup> de Marto 1910 (t.e. post 43 jaroj), Maria Maddalena, nomata Magda, Olivero naskiĝis en Saluzzo. Al ŝi ni dediĉas ĉi tiujn paĝojn, okaze de ŝia alproksimiĝinta 98a naskiĝtago por rememori al la legantoj grandan gloron de la lirika muziko ne nur itala sed eĉ monda.

Ni komencis per la mallongaj biografioj de du grandaj sopranulinoj de la generacio antaŭ tiu, de la Olivero, Storchio kaj Muzio, kiujn ŝi neniam renkontis persone. Ni tion faris surbaze de tiuj konektoj, kvankam malfortaj:

- Rosina Storchio, kiu estis amantino de Toscanini dum kelkaj jaroj, kaj havis filon de li (grave malsana, la knabo mortis adoleskante), forlasinte la scenejon, ŝi sin dediĉis al la prizorgo de handikapitaj infanoj ĉe “Cottolengo” de Milano; ŝia hejmo estis en corso Magenta 68, tre proksime al la domo kie Olivero vivas nun. ....
- Claudia Muzio havis preskaŭ neniun konkuranton kiel sopranulinon. Ŝi kutime uzis, por atingi la teatron, kaleŝon trejnita de blankaj ĉevaloj kaj kovrita per blankaj rozoj, kiel Olivero diris al mi. Ŝi estis nomita “divina” de Eugenio Montale, la granda poeto kiu ricevis la Premion Nobel kaj estis ankaŭ bonega muzika kritikanto. En sia verko “Stelle della lirica” unue eldonita en Usono kaj poste en Italio, Stinchelli, prezentisto de la radioelsendo “La Barcaccia”, eble la plej fama itala muzika kritikanto, konsiderinte pli ol 300 kantistinojn, li vokis divina nur Magda-n Olivero-n.

Ni ankaŭ povus memori ke orkestrestro Tullio Serafin deklaris, antaŭ ol Olivero komencis sian karieron, ke *“inter la kantistoj estas tri mirakloj, Caruso, Titta Ruffo kaj Ponselle; inter la aliaj iuj .. estas tre bonaj”*. Eble por Serafin ..estus aldonendaj poste Chaliapin kaj Olivero. Kiam Serafin estis trejnanta Olivero-n por kanti en Adriana Lecouvreur reveninte al la teatroj, li diris al ŝi *“Vi estas ĉiam la numero unu”*. Kiam Olivero, estante pli ol kvindekjaraĝa, komencis sian travojaĝon al USONO kun grandega sukceso, la granda Ponselle jam emeritiĝis kaj ne estis ĉe ŝiaj prezentoj, sed ŝi aŭskultis ŝin en la radio kaj telefonis al ŝi por gratuli ŝin pro la kantado.

La impulso skribi ĉi tiun artikoleon estas, antaŭ ĉio, memori kantistinon kiu estas gloro de itala lirika muziko kies grandega arto, nesufiĉe bone estis taksata de la amaskomunikiloj, kiuj estis pli interesiĝitaj pri la kazo de Callas kaj pri la supozita malamikeco inter ŝi kaj Tebaldi. Sed mia impulso ankaŭ venas de mia memoro mem. Mi estis knabo dekjara kaj studis pianludadon de antaŭ nur du jaroj. Mi estis scivolema pri la muzikaj lirikaj partituroj kiujn mi trovis inter la libroj restintaj tie post la bombado kiu detruis la domon de miaj geavoj; kiam mi demandis mian patrinon kiuj estis la plej grandaj kantistoj; ŝi alrespondis: *“Tenoruloj, Tito Schipa kaj Beniamino Gigli; sopranulinoj Renata Tebaldi kaj Magda Olivero.”* Nur de antaŭ kelkaj jaroj mi evoluigis en mia animo gravan intereson pri opero. Schipa kaj Gigli forpasis jam de longa tempo, Tebaldi nur lastatempe (Mi nur povis havi mallongan paroladon kun ŝi pere de telefono ; ŝi estis jam malsana pro kancero). Sed mi bonŝance sukcesis renkonti sinjorinon Olivero-n dank' al Profesoro. Crespi, profesoro pri juro, pianludisto, muzikologo kaj kolektanto de antikvaj sanktaj pentraĵoj ( li donacis sian kolekton je la valoro de cent milionoj da eŭroj, al la Milana Dioceza Muzeo). Estis Novembro 2003, kaj ekde tiu tago en 2003 mi havis la ŝancon ĉiam pli profunde ekkoni personon kiu ne estas nur atinginta la kulminon de de la lirika kariero sed estas ankaŭ imponega pro sia homeco.

Ĉar mi ne estas muzikologo, mi volas lasi flanken la apartajn aspektojn de la kantmaniero de sinjorino Olivero, mi pritraktos nur ŝiajn biografiajn erojn. Mi vokos ŝin Magda, kiel ŝi permesas al tiuj, kiujn ŝi renkontas, tamen mi ĉiam rememoros kiel Giulietta Simionato, la granda mezosopranulino, preskaŭ tri monatoj pli juna ol ŝi, nomis ŝin, dum telefonvoko kun mi, la *“Sinjorino de la lirika muziko”*.

Magda naskiĝis en Saluzzo en familio de bona socia kaj kultura nivelo, kiu praktikadis tradician formon de Katolikismo, al kiu ŝi restis ĉiam fidela. Tiu ĉi aspekto estas rimarkinda malegaleco inter ŝi kaj multaj aliaj kantistoj kies devenoj estas aŭ el la laboristaro (Caruso...) aŭ el la kamparana mondo, kie kantado dum laboro estis ofta kutimo. Goethe, en sia verko *“Vojaĝo al Italio”*, asertas ke ĉie en Italio homoj kutimis kanti ....tiu kutimo nun preskaŭ malaperis, ankaŭ inter la patrinoj, kiuj, laŭ mi baldaŭ ne plu kantos lulkantojn aŭ aliajn aferojn al la beboj. Magda tre frue komencis siajn muzikajn studojn (kvankam ŝi estis ankaŭ allogita de kariero kiel teatra aktorino, ŝi estis admirantino de Sarah Ferrati), tamen ŝi preferis la lirikan kantadon. Okaze de du provaŭskultadoj en Torino ĉe EIAR, la Itala Radio Agentejo, ŝi estis juĝita negative, kiel mankanta je ĉiuj kvalitoj por kantistino! Ĉe la dua provaŭskultado, tamen, la Majstro Gerussi, heredanto de la granda kantadtekniko de Cotogni, juĝis ke ŝi havas kvalitojn kiuj estis ruinigitaj de ŝiaj antaŭaj instruistoj. Do li prenis ŝin kiel sian studentinon, sub lia trejnado kaj poste sub tiu de la Majstro Luigi Ricci kaj danke al grandega kaj peniga engaĝiĝo, fine, Magda forigis siajn erarojn pri spirado kiujn ŝi estis akirintaj de ŝiaj antaŭaj instruistoj kaj ŝi evoluigis esceptajn teknikajn kapablojn. Ŝi povis atingi altan G (La sopranulino Callas, laŭ Stinchelli, atingis altan F; la sopranulino Pagliughi kapablis atingi la altan G. diezon; sed la afrikaj kantistinoj, inter la Berberoj kaj la Pigmeoj, povas atingi eĉ pli altajn notojn!) Ŝi povis trairi du kaj pli voĉigaĵojn per unu nura enspiro, afero kiu lasis Lauri Volpi-n mirigita. Estis norma afero al ŝi povi atingi la finon de opero sen laciĝo de la voĉa organo, nur kun la mensa kaj psikologia laciĝo pro ŝia plena

identigo kun la persono kies rolon ŝi estis ludanta kaj kantanta. Iatemp post kantado de kvar operoj dum unu semajno, la gorg - specialisto kiu estis konsultita de la kantistoj de "La Scala petis al ŝi la permeson rigardi ŝiajn voĉkordojn. Li estis mirigita ĉar ili elmontris nenian indikon de laceco, kvazaŭ ŝi neniam estis kantinta! Danke al sia escepta tekniko, Magda povis kanti dum kvindek jaroj, kaj ŝi estus certe daŭriginta kanti se intertempe ne estus okazinta la perdo de la edzo. Post la emeritigo ŝi ankoraŭ registris multon de Adriana Lecouvreur en 1993 akompanata ĉe la piano de Carmelina Gandolfo, kaj parto de Bohème en 1999, kiam ŝi jam estis 89jaraĝa! Eĉ en postaj jaroj ŝi ankoraŭ kantis himnojn al la Sankta Virgulino Maria en la preĝejo de Solda, en la Alpoj de Tirolo, ĉiun 15 an de aŭgusto. Ŝi estis voĉo, sekve, por kvar generacioj, ne nur por tri, kiel diras la titolo de sia biografio de Quattrocchi "Una Voce per Tre Generazioni". Oni devas krome mencii ke kiam sinjorino Callas revenis al la scenejoj por denove kanti operojn kune kun la tenorulo Di Stefano, post sia malĉeesto dum la kunvivado kun Onassis, ŝi konstatis ke sia voĉo ne plu estis tia kiel antaŭe kaj diris: "Nur Sinjorino Olivero povus min helpi.... sed estas tro malfrue.

La unua publika apero de Magda okazis en 1932, sekvita de kelkaj prezentoj en la Carro di Tespi organizita de Achille Starace, la sekretario de la faŝista registaro. Tre frue ŝi aperis en la grandaj teatroj. Komence ŝi kantis operojn de komponistoj de la unua duono de la deknaŭa jarcento, sed baldaŭ ŝi moviĝis al verismaj operoj, ŝi havis grandegajn sukcesojn, precipe en Traviata ĉe la "Teatro Regio" en Parma kaj en Adriana Lecouvreur de Cilea. ĉi tie estas memorinda anekdoto: fine de la kantado de "Adriana", dum ŝi estis en sia, fine malplena tualetejo, ŝi rimarkis virinon silente plorantan. La sinjorino alproksimiĝis al ŝi, brakumis ŝin kaj diris: "Ĝis hodiaŭ Adriana estis mi; hodiaŭ ŝi estas vi." La sinjorino estis Giuseppina Cobelli, unu el la grandaj sopranulinoj de La dudekaj jaroj de la pasinta jarcento, kiu baldaŭ malaperis de la scenejo, pro nekuracebla neaŭdebleco.

En la jaro 1941a ŝi edziniĝis kaj lasis operon, opiniante ke tia laboro estis neakordigebla kun normala geedza vivo, kaj eble ankaŭ pro la problemoj kiujn kaŭzis la milito. En 1946 Toscanini, kiu estis en Italio pro la remalfermo de La Scala, rekonstruita post la milita bombardado, volis ricevi ŝin kiel la sopranulino; li neniam antaŭe estis sukcesinta renkonti ŝin sed multe ŝatadis ŝin tra la radio dissendoj. Tamen neniu prizorgis sciigi al ŝi la deziron de la majstro (pli ĝuste, iu ne deziris ŝian revenon sur la scenejo). Do La Scala remalfermis kun la ĵus eltrovita sopranulino Renata Tebaldi, kiu impresis Toscanini-n per la du famaj pecoj el la tria akto de Otello. Magda rekomencis sian karieron kiel operkantistino en 1951. Tiutempe ŝi jam sciis ke ŝi neniam povus esti patrino. Cetere la komponisto Cilea multe insistis por ke ŝi denove kantu en Adriana, laŭ sia maniero kiu perfekte reprezentis lian vidon de la heroino. Magda preparis sian rolon kun la majstro Tullio Serafin, kiu diris al ŝi: "Vi estas ĉiam "La numero unu". Ŝia kariero, rekomencis post dek jaroj -- verŝajne fakto kiu unikas en la historio de la opero – kaj daŭris tridek jarojn. Ŝi kantis en multaj lokoj en Italio kaj eksterlande, aperanta en proksimume okdek operoj inter la preskaŭ cent kiujn ŝi estis lerninta.

Ŝi havis grandegan sukceson en Usono, precipe en Dallas kaj Novjorko, ĉe la teatro Metropolitan kie ŝia Tosca ricevis kvardek minutojn da aplaŭdoj, ĝi estis loka rekordo. La spektantaro estis ensorĉita de ŝia agado kaj kantado, kaj ankaŭ de ŝia fizika beleco kaj sinteno, kaj pro tiuj aferoj multaj homoj nomis ŝin la "Alida Valli de lirika muziko". Ni scivolas pri kio estus okazinta se ŝi estus kantinta en Adriana Lecouvreur, kiu estis nuligita pro kialoj kiujn ni evitas riparoli.

Magda kantis kun tielaj kolegoj kiel Pertile, Gigli, Schipa, Prandelli, Tagliavini, Corelli, Di Stefano, Pavarotti, Domingo, Bastianini, Protti, Simionato, Stignani.... Bedaŭrinde ekzistas malmultaj diskoj pri ŝiaj prezentoj kaj preskaŭ ĉiuj estas rekte registritaj, malmultaj estas registritaj en iu studio. Ĉi tiu ignorado fare de komercaj firmaoj povus esti parte klarigita de la fakto, ke Magda neniam agis kiel stelulino por fariĝi fama. Sed estas tamen iuj esperoj ke



diskoj de koncertoj elsenditaj de radio, EIAR, povus iam esti retrovitaj en la arkivoj. Tiu estas grava tasko por muzikologoj.

La jaro 2007 estis dediĉita al la memoro de Toscanini kvindek jarojn post lia morto, kaj al tiu, de Callas, tridek jarojn post ŝia forpaso. Maria Callas estis treege granda sopranulino (kvankam aktiva dum nur dek du jaroj -- ŝi havis longan paŭzon dum sia afero kun Onassis, kaj kiam ŝi revenis al la scenejo sia voĉo estis perdinta ĝiajn antaŭajn kvalitojn). Ŝi povas esti konsiderita la plej fama sopranulino de la dudeka jarcento, tio ŝuldiĝas grandparte al ŝia amindumadoj kaj al imagita, sed efektive ne reala, artisma milito kontraŭ Tebaldi. La amaskomunikiloj preskaŭ ĉiam difinis ŝin kiel la plej granda sopranulino de la dudeka jarcento. Hodiaŭ decidi kiu estis la plej granda estas tasko kiu ne povas esti solvita de nura objektiva analizo, ĉar tio estas influata ĉiam de la personaj preferoj. Tie ĉi ni deziras raporti iuj juĝoj pri Olivero eltiritaj de la kvalifikita literaturo, kiu indikas ŝin ankoraŭ kiel alternativon al Callas por la titolo de numero unu. El la verko de Stinchelli, "*Stelle della lirica*" mi cite transskribas :

- *Oni pensu pri Tito Gobbi, Mirto Picchi, Magda Olivero, Gino Bechi, kies voĉoj ne povas esti difinitaj kiel "belaj" sed estas dotitaj je interpretaj kvalitoj kaj, en la kazo de la divina Magda, ankaŭ je absolute escepta tekniko.*
- *Arto ne havas aĝo, vidu Magda Olivero... estas neforgeseblaj ŝiaj intensaj interpretoj ....kie en etoso de kreskantaj emocioj ŝi elmontris tranĉantaj kaj brulantajn vortojn sekvitajn de ekstazaj aŭ melankoliaj esprimoj kun senkompara esprima intenseco, danke al ĉiam perfekta rego de la voĉeligo kaj al absoluta rego de la spiroj.*

El *Opera fanatic*, la revuo de Stefan Zucker, muzika kritikanto kiu produktis dokumentarion kun intervjuoj de kelkaj steloj de la lirika muziko, ni raportas: "*Fari elekton inter Callas kaj Olivero, mi ..nun, efektive elektus Sinjorinon Olivero. Ŝi havas pli grandan varmon kaj profundecon kaj estas pli emocia.*"

La granda baritonulo Giuseppe Valdengo estis elektita de T. por kanti la lastajn operojn de Verdi kiujn li estris. Valdengo aŭdis Sinjorinon Olivero dum la kantado de iu Traviata en la tridekaj jaroj de la pasinta jarcento en Parma. Li diris al mi ke li neniam plu havis la okazon aŭskulti Violetta -n tiel belegan. Kiam mi vizitis lin en Saint Vincent en Aosta Valo, mi proponis al li telefonalkvoki Magdan kun kiu li neniam antaŭe parolis. Komence li hezitis, li timis ne povi reteni la larmojn, sed poste li prenis la telefonon:"Kolegino.... " Valdengo forpasis komence de oktobro en 2007, alia forpasinto inter la grandegaj kantistoj kiuj honoris la italan lirikan muzikon en la dudeka jarcento.

Antaŭnelonge mi renkontis kunlaboranton de la granda tenorulo Ettore Parmeggiani, kiu kantis Wagneron dum pli ol dudek jaroj ĉe La Scala kaj post la Dua Mondmilito fariĝis la ĉefo de la aplaŭdantaro tie. Ĉi tiu mia amiko, Luigi Cestari, estis ankaŭ membro de la aplaŭdantaro kaj povis aŭskulti centojn da gekantistoj. Dum unu jaro li aŭskultis 187 operojn el kiuj sep estis kantitaj ankaŭ de Sinjorino Olivero. Li diris al mi ke "Magda Olivero estis la sola kantistino kies voĉo povis sentigi internajn tremetojn pro emociiĝo.

Je la fino de la jaro 2007a okazis la unua internacia konkurso por gekantistoj je la nomo de "Magda Olivero", ĝin venkis korea baritonulo, la duan premion venkis japana tenorulo, la trian premion venkis, egalmerite, rusino kaj ukrainino.... estis preskaŭ 200 partoprenantoj el kiuj nur du estis italoj. Eĉ tiu estas drameca signo de la disfaliĝo en Italio por la lirika muziko.

Kara Magda, jam pasis multaj jaroj ekde kiam, nur dujara infanino kun ĉapeleto surkape, vi kantis *Torna a Surriento* alkrociĝinte al fenestro-krado en Saluzzo. Ni vin volas kune kun ni ankoraŭ dum multaj jaroj, ĉiam vigla, vivplena kaj kun bona vido eĉ kiam viaj jaroj estos pli

ol la multaj jaroj, 101, vivitaj de Gina Cigna, kiu estis Turandot en la 30aj jaroj de la pasinta jarcento, kiam vi kantis kun ŝi kiel Liu.

## **ALDONAĴO: KELKAJ JUĜOJ PRI MAGDA OLIVERO**

**EL Alfredo Kraus, *Confidencias para una leyenda. Conversaciones con Francis Lacombrade***

**Ediciones del cabildo de Gran Canaria, Las Palmas de Gran Canaria, 2000**

*Kraus, viaj "Violette" nomiĝis Magda Olivero, Maria Callas.... Ha, Magda! Mi neniam kaŝis mian sinceran respektemon al ŝi. Granda estis mia surpriziĝo kiam, dum la provludoj, mi konstatis ke ŝi kondukis kiel komencantino. Ŝi atendis paciencie, ŝi petis opiniojn kaj korektojn de la orkestrestro kaj de la scenejestro per nekredebla humileco. La sperto en Torino nin amikigis por ĉiam. Pasintjare mi kantis "Faust" en Parma kaj ŝi venis, entuziasme, min aŭskulti. "Finfine mi trovis iun kiu kantas "bele" kiel estas skribite". Belan koleginon, virinon kun koro mi trovis...*

**EL Lanfranco Rasponi, *The last prima donnas.***

**Limelight Editions, New York 1985**

**Intervjuo al Eva Turner**

*Krom "La Scala", Torino estis mia dua itala hejmo... mia kantista partnero en "Don Giovanni estis Carlo Galeffi, ideala ĉefrolulo. Kaj ĉu vi scias kiu estis Zerlina? Ŝi estis Magda Olivero. Ŝi ankoraŭ kantas kaj mi devas gratuli ŝin! Ŝi ĉiam havis tre apartan kvaliton, temas ne tiom pri bela voĉo kiom pri magneta altira kvalito sur la scenejo, kiun malmultaj homoj havas...*

**Intervjuo al Gilda della Rizza.**

*En mia epoko oni fordonis ĉion el si mem por la bono de la arto, ĉar ni kredis je kio ni faris. Puccini povis peti al mi iri ĉien por kanti por li per eta rekompenco kaj mi estus akceptinta tion. Hodiaŭ ekzistas, certe, grandaj voĉoj, tiaj kaj eĉ plej belaj ol en mia epoko. Sed ili nenion fordonas el si. Ofte mi demandas min: "kien ili metis sian koron? Ĉu ili naskiĝis sen koro? Kiel oni povas kanti per tiel bela voĉo tian dian muzikon kaj nenion meti en tio?"*

*Mi cerbumas kaj ekkonas la respondon: tiuj kantistoj vivas en mondo tre malsimila al la mia, ĝi estas sen idealoj, en ĝi la patriotismo estas priridata, la familiaj ligoj disfalis kaj la entuziasmo ne plu ekzistas. Ŝi haltis dum momento kaj aldonis: "Mi devas fari escepton, tio estas Magda Olivero. Mi ne scias kiom ŝi aĝas, sed ŝi superis la sesdekjariĝon jam de kelka tempo. Tio ne gravas. Ŝi estas la sola por kies aŭskultado mi marŝus sub la pluvo kaj en la malvarmo. Mi ne priparolos*

*ŝian voĉon, ĝi estas tia kia ĝi estas sed tiu virino konas el kio konsistas arto. Mi estis tiel kortuŝita de sia Adriana ke mi pensis ke Dio helpis Magdan antaŭeniri dum tiom da jaroj por ke la homoj povu ankoraŭ scii kia estis la epoko kiam kanti estis arto.*

### **Intervjuo al Maria Laurenti**

*Mi opinias ke estas por ĉiu artisto epoko por fini, elegante, sian karieron. Ekzistas maloftaj esceptoj kiel Magda Olivero. Ŝi estas aparta fenomeno. Iam ŝi kantis pianissime kiel se ŝi estus alimondanino. Mi demandis al ŝi kiel ŝi sukcesas tion fari, mi opiniis ke temis pri kapnotoj. Tute ne! Ŝi prenis al mi la manon kaj ĝin apogis al sia diafragmo, kiu estis malmola kiel roko. Neniu konas ŝian veran aĝon, sed tio ne gravas. Kio gravas estas ke per voĉoflusto, eĉ dispeciĝinta, ŝi povu teni la tutan ĉeestantaron en sia manplato. Tio estas arto.*

### **Intervjuo al Germana di Giulio**

*... Mi aŭskultis Magda-n Olivero-n, unuafoje, en Torino kiam ŝi kantis en la “Francesca da Rimini”. Multaj el miaj gekolegoj inklinas subtaksi ŝin, mi ne scias kial, eble ili envidias ŝin ĉar ŝi daŭras kanti kaj ili tion ne plu faras. Tiam mi estis ege imponita de ŝi kaj ankoraŭ tia mi estas. Mi engaĝiĝis malkovri kiel, eĉ havante voĉorganon relative negrandkvalitan rilate al la povo kaj tembro, tiu virino, povis kaj ankoraŭ povas teni la ĉeestantaron tute kaptita. Post kiam mi aŭskultis ŝin plurfoje, mi tion malkovris. Temas pri ŝia vokaliĝa mastreco. Nuntempe ĉiuj kantistoj fermas la vokalojn, opiniante ke, tiamaniere, la voĉtono laŭtiĝu, sed ŝi konas pli bone la aferojn. La homoj ne iras pro ŝia voĉo aŭskulti Olivero-n, kiu ankoraŭ ĝuas plenan sukceson, eĉ alproksimiĝante al la sepdekjariĝo. Temas pri ŝia prononcmaniere nekredeble klara, temas pri la valoro de ĉiu aparta vorto, kiun la aliaj forgesis en la tieldirita kuniĝo de la voĉorgano kun la orkestro. Instinkte, la ĉeestantaro ŝatas tion. Poste, kompreneble, venas la personeco, alia perdita afero. Ŝi havas la povon sentigi al la ĉeestantoj la privilegion esti kun ŝi, kaj ŝia maniere alveni al la scenejo ĉe ĉiu aplaŭdo, sin moviĝante en la tuta lumigita spaco, pensigas al ĉiuj ke ŝi dankas ĉiun persone. Kvankam el la voĉo oni sentas la tempopason, ŝia voĉo estas ĉiam harmonia kaj ankoraŭ kapablas voĉkanti per tono kiu ŝajnas ne aparteni al tera voĉorgano. Ŝiaj sintenoj estas tiuj de granda sinjorino, ŝi estas aparte ŝatata eĉ en tiu ĉi ĥaosa demokratio.*

### **Intervjuo al Gemma Bosini Stabile**

*Ĉiuj scias kiel malfacilas teniĝi en “Vissi d’arte”. Ĉu ŝi kantas al si mem, ĉu ŝi preĝpetas la Sanktan Virgulinon, aŭ ĉu ŝi sin adresas al ĉefpolicisto? Ekzistas diversaj manieroj ĝin interpreti. Jeritza kantis tute sternite sur la pavimo, Olivero kantis delasita sur sofo...*

### **El Giacomo Lauri Volpi, Voci Parallele**

**Bongiovanni, Bologna, 1977**

*Magda Olivero havas voĉon malpli potenca kaj drameca ol Mazzoleni, sed ankaŭ ŝi estante klera kaj rafinita, referas lian plensonan spiritecon, laŭ la delikateco de moduladoj kaj nuancoj. La verkisto estis apud ŝi en la “Fanciulla del West kaj en “Turandot”: efika interpretistino de Minnie kaj poezia, kortuŝa Liù. Ŝiaj duonvoĉaj startoj estas veraj preciozeco. Magda Olivero*

*nuntempe povus esti la numero unu inter la miksitaj lirikaj sopranuloj, kun altega taksado (fakte nuntempe la granda interpretistino estas unika kazo inter la sopranuloj pro longdaŭro de sia lirika kariero kaj pro la elstara kantista majstreco.*

**Esperantigis: Silvia Garnero**

**La ĉi suba fotoĵo estis fotita printempe en la jaro 2007a okaze de vizito de S-no Magda Olivero al Profesoro Spedicato**



La fotoĵojn de Toscanini provizis la nepino de la majstro Emanuela Castelbarco

